BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL
Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

CGC Nº
00406 504/1000-06

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 226-1298
70.000 – Brasília (DF)

JANEIRO/FEVEREIRO DE 1981 ÓRGÃO OFICIAL DO BKE BOLETIM Nº 59

**REDAÇÃO: MARIA ALMADA**

## LA 66-A UK EN BRAZILIO

La plej grava manifestacio de nia movado estas la Universalaj Kongresoj. Ĉiujare en iu ajn lando kolektiĝas la anaro. Feliĉe, la nombro de la partoprenantoj ĉiam pli kaj kreskas, sed malgraŭ tio, nur malofte okazas kongreso ekster Eŭropo. En Nord-Ameriko jam okazis du, en Azio unu, kaj nun la unuan fojn kongresos la movado en la suda hemisferio, en nia lando. Neofte okazas, ke la esperantistoj el la Latin-Ameriko partoprenas la UK-ojn, sed ĉijare ili havos okazon ĝui la amikan etoson de la tutmonda Esperanto-movado. Jam estas evidente, ke la latinamerikanoj partoprenos ĝin amase. Evidentiĝos la deziro de D-ro Zamenhof, ke la diversaj partoj de la mondo alproksimiĝu kaj la popoloj komprenu unuj la aliajn pere de la internacia lingvo.

La 21-jaraĝa ĉefurbo de Brazilo, kiu nur havas futuron, gastigos Esperanton, la lingvon de la futuro. La esperantistaro en nia lando emocie sin preparas por la granda evento.

La L.K.K. fortostreĉe laboras por ke la gastigado de la UK estu komforte organizita, ke restu en la memoro de niaj bonvenontaj gastoj la vizito al Brazilo, dum longa tempo. Tra la tuta lando novaj gelernantoj klopodas ekregi la belegan internacian lingvon por iu afabla kontakto kun la atendataj gesamideanoj. Ĉies kunlaborado estas bonvena kaj dezirata. Ni bezonas volontulojn, bone kaj flue parolantajn Esperanton, por ke la vizitontoj ricevu informojn bezonatajn. La interesoj de la alilandanoj estos grandaj. Aliĝis ĝis la fino de 1980 ĉirkaŭ mil personoj el pli ol kvardek landoj. Tiu granda amaso da homoj dum la 66-a UK en Brazilo parolos nur Esperanton.

Alvenis la ebleco akiri novajn geamikojn, konatiĝi kun la korespondantoj, akiri bonegajn librojn kaj elmontri la faman brazilan gastamecon.

Ek al Brazilio!

## L.K.K. – INFORMOJ

Estas decidite, informas la LKK, el Brazilio, ke la Ĝenerala Poŝtoficejo eldonos la 25-an de julio venonta specialan poŝtmarkon memore al 66-a UK en Brazilo. La nombro de la partoprenontoj de la 66-a UK pli kaj pli kreskas. La intereso pri la evento estas vere mirinda. Tiu, kiu ankoraŭ ne enskribiĝis devas tion fari tuj ĉar post la 31-a de marto, kiel okazis en januaro, denove altiĝos la kongreskotizoj. Certe ĉiuj ŝatas, ke siaj nomoj aperu en la kongreslibro, ĉar la unuan fojon okazos en Brazilo Universala Kongreso de Esperanto, kio sendube ne ripetiĝos baldaŭ. Eluzu ni la okazon! Ek al Brazilio!

Gis la fino de decembro enskrigiĝis laŭstate kaj laŭnombre partoprenontoj al la 66a UK: Alagoas ;; Bahia 24; Ceará 3; Distrito Federal 38; Espírito Santo 2; Goiás 11; Minas Gerais 28; Paraná 16; Pernambuco 19; Piauí 1; Rio de Janeiro 121; Rio Grande do Sul 28; Santa Catarina 3; São Paulo 98; Sergipe 1 e Rio Grande do Norte 8; entute 403.

## NI DANKAS

La redakcion de nia Informa Bulteno ĉe la jarfino atingis ĉirkau cent gratulleteroj. Bendaŭrinde ne eblas al ni respondi al ĉiuj aparte. Ni ricevis bondezirojn de la prezidanto de UEA, S-ro Gregoire Maertens, el Belgio, kaj de la direktoro pri organizaĵoj de UEA, s-ro Renato Corsetti, el Italio. Ni dankas ĉies bordezirojn kaj la kuraĝigajn vortojn rilate nian poresperantan laboron.

Ni same deziras al ĉiuj feliĉan kaj prosperan novjaron!

## C A Í (RS)

Nia kara samideano Oto Vaske, kiu estas radiamatoro, informas, kepere de verdaj ondoj ĉiutage kontaktas ekde 24 horo GMT (21:00 loka horo) viglas telegrafe ĉirkaŭ frekvenco 7.010,0 kc; SSB, cirkaŭ 7.110,o kc. Li invitas tiujn, kiuj ankoraŭ ne estas radiamatoroj partopreni la reton, helpante inundi la eteron per verdaj QSOj, antaŭdankante al ĉiu alvoko. Lia prefikso: PY3ACE/Kaí. Vaske.

## EL NIA LANDO:

## SALVADOR (BA):

Nia vicprezidanto José Saraiva Matos, informas nin, ke oni festis la 15-an de decembro pasinta, omaĝe al la datreveno de Ludoviko Lazaro Zamenhof, laŭ la jena programo: 1) Patro Nia (Edson); 2) Preĝo sub la Verba Standardo (Saraiva, en Esperanto kaj Aldeira, portugallingve); 3) J. Carlos - "Diris Jesuo" kaj Asterio (traduko de la diroj); 4) Dimanĉa promenado;5) Aldacy kaj Solange (Evangeliaj citaĵoj); 6) Himno de la Kristana Ĝojo - Omaĝe al Leopoldo Machado; 7) Edson - Citaĵo de Mahatma Gandhi; Raymundo - La saman citaĵon en ela portugala lingvo; 7) Flamo de la Saŭdado.

Pro manko de spaco ni publikigas resume la programon.

Ankaŭ sciigas nin nia vicprezidanto Sergio Luiz Souza Santos, el tiu urbo, ke la 25-an de decembro la societanoj kunvenis antaŭ la statuo de Zamenhof por omaĝi lin. La festparoladon faris s-ano Alberico de Jesus Teixeira. Li ek instruis Esperanton kaj la prezidanto prof-ro Isao Noguto gvidas korespondan kurson.

La 5-an de decembro geedziĝis la gesamideanoj Joilda de Moraes Rego kaj Jackson Atila S.Galvão. La ceremonion partoprenis multaj esperantistoj. Estas menciindes, ke la novaj geedzoj lernis Esperanton kaj nun instruasĝin. Ni gratulas al novaj geedzoj dezirante al ili longan vivon kaj sukcesplenan laboron en nia Esperanto-movado.

## RIO DE JANEIRO (RJ)

La "Spirita Eldonejo F.V. Lorenz" informas ke novaj membroj estas akceptataj, kaj ke folioj enhavantaj spiritajn mesaĝojn el la Transmondo estas sendataj senpage kaj spiratjn librojn al petantoj.

La adreso estas: "Spirita Edona Societo F. V. Lorenz", Caixa Postal 3.133 20.000 - Rio de Janeiro (RJ) - Bv. sendi 1 respondkuponon por la afranko kaj 3 por la libro.

Prof-ro Walter Francini, vicprezidanto de BKE, kies bonegajn librojn oni povas aĉeti en la sidejo de BKE - (SCS - Edif. Jockey Club, sala 103 aŭ "Caixa Postal 04-0406 - CEP 70.000 - Brasília - DF). Kiu volas helpi BKE volu aĉeti la libron "Esperanto sen Antaŭjuĝo" - Antecipe, dankon.

Li sendis al ni sciigojn pri nova Esperanto-kurso per radio: "Aŭdu kaj lernu". Ĉiulunde je la 14:30 horo estas disradiigataj lecionoj, kaj vespere je la 22:15 horo denove dissendataj de Radio Cultura da Fundação Anchieta (São Paulo), sur ondoj de 1200 Khz. Gravurigis ilin "SONO-VISO" kaj estis ellaborita de prof-ro Sylla Chaves.

## NITERÓI (RJ)

La prezidanto de la Niteroi-Esperanto Grupo, D-ro Joaquim do Couto, informis, ke la Societo festis la 15-an de decembro, naskiĝtago de L.L. Zamenhof. Ĉe la solena malfermo de la evento parolis s-ro José Alberto Moraes e Silva. Poste estis disdonitaj diplomaj al kursfinintoj.

## ILHÉUS (BA)

S-ro Eleus Leonardo de Sá, nia vicprezidanto, sendis al ni gazeteltranĉaĵojn kaj plurajn sciigojn. Estas laŭdinda la klopodoj de nia samideano por disvastigi la internacian lingvon. Li verkas artikolojn, instruas, propagandas pri la Zamenhofa idealo.

Post la 65-a UK, li vizitis Varsovion kaj la tombejon, kie ripozas nia kara Majstro kun sia edzino Klara Zilbernik. Li sendis ankaŭ kelkajn trobojn el kiuj ni publikigas du:

### EGALECO

Al ni venis Esperanto
kun amo kaj egaleco;
ĝia bela, dolĉa kanto
estas kanto de frateco.

Ĉiuj amas Esperanton,
ankaŭ la tuta homar
Ni aŭdas belan kanton
de frateco kaj fratar

### BARRA MANSA (RJ)

Informas nin la gazeto "O Líder" el tiu ĉi urbo, ke estis eldonita leĝo sub Nº. 1.556/80 de la urbestro, s-ro Marcelo Grable, por la nomumo de iu strato "Esperanto". En Barra Mansa aktivas la Familio Deslandes: D-ro Wilson, S-rino Denise kaj la filino Lygia, kiuj bone scipovas Esperanton.

### VOLTA REDONDA (RJ)

La spiritisma periodaĵo "A Caminho da Luz", el tiu grava urbo aperigis gravan artikolon pri Esperanto.

Informas nin nia vicprezidanto, D-ro Alberto Flores, ke nuntempe la junularo aktivas entuziasme en tiu urbo. La gazeton sendis al ni s-ano Luciano Pereira, al kiu ni dankas la afablecon.

### CAÇAPAVA (SP)

S-ano Majoro Gilberto A. Silva Velho, krom ĉiaspecan propagandon pri Esperanto, organizis kurson en Caçapava, ĉar la intereso pri la internacia lingvo estas nuntempe sufiĉe granda.

Li kunlaboras kun pluraj gazetoj, aŭtoritatuloj kaj grupoj esperantistas tra la tuta lando. Li batalas por restarigi la bustojn de Zamenhof, en Santos Dumont (MG) kaj Curitiba (PR), kiuj pro malsamaj kaŭsoj estis forigitaj el siaj lokoj.

Krom tio li kunlaboras kun reprezentantoj de la "Revista Portuguesa de Esperanto" (Portugalio). Tiu revuo aperigis artikolon "Lições que o Brasil nos dá" kaj amplekse komentarias la laboron de la brazilaj esperantistoj.

La "Gazeta da Cidade", el São José dos Campos, aperigis liajn informojn pri la 66-a UK. Same, "Diário de Jacareí" agis, kaj pluraj spiritismaj periodaĵoj publikigis liajn artikolojn. Gratulon al nia diligenta Silva Velho!

### GUARULHOS (SP)

La gazeto el tiu urbo "Guaru - news" aperigis elstaran artikolon pri Esperanto kaj ĝia movado, pritraktante ankaŭ la 66-an UK'n okazontan en nia lando ĉijare. La sciigon verkis s-ano Lacorday Andrade, vicprezidanto de BKE. Lia kunlaborantino, prof-ino Marcia Clélia Moina, same multe laboradas por Esperanto en Guarulhos. Prof-ro Lacorday estas organizanta kurson, kiu komenciĝos post la ferioj. Ni deziras al li sukceson.

### BAURU (SP)

Prof-ro João Antonio Fraga Padilha, el tiu progresema urbo, informis nin ke la movado tie marŝas kontentige. La prezidanto de la societo, prof-ro Euclydes Geraldis de Carvalho, lerte kaj diligente disvastigas Esperanton en sia urbo. Estas organizitaj kunvenoj por praktikadi la lingvon. En la spiritismaj medioj oni instruas la internacian lingvon ĉiusabate. Tiujn kursojn gvidas s-ano José dos Santos Simas, kaj dimanĉe Francisco Barbosa Bueno. Estas planataj kursoj por diversaj fakultatoj. La anaro daŭre laboras por akiri propan sidejon; la tereno jam estis aĉetita, sed nun oni devas konstrui la domon por la sidejo, do, la kampanjo vigle marŝas.

En la "Escola Progresso de Bauru" nia vicprezidanto Ivon Barbosa, s-ano Levy Resta Amorim kaj prof-ro João Antonio Fraga Padilha instruas la internacian lingvon. La loka informilo "Jornal da Cidade" ĉiudimanĉe aperigas artikolon sub la titolo "Que língua falar?". Prof-ro Padilha havas bonŝancon aŭdi en Bauru la "Rqdion Pekin", kiu disaŭdigas esperantajn novaĵojn kaj propagandas pri la lingvo. Ni dankas la informojn kaj gratulas al Bauruanoj, kiuj amase sin preparas por partopreni la 66-an UK's en Brazilio.

### CAMPINAS (SP)

Kun granda intereso kaj ĝojo ni legis artikolon sur gazeto el tiu urbo sub

la titolo "Na Física do Unicampo um curso (livre) de Esperanto".

Kelkaj junuloj eltrovis ĉe la Universitato la prof-ron Ivanhoê Baracho da Genetica kaj kunvokis la studentaron lerni la internacian lingvon, kies kurso estas gvidata de la prof-ro Geraldo Weber. Enskribiĝis pli ol 30 gejunuloj, kiuj ĝis tiam neniam aŭdis pri Esperanto. Krom s-ano Weber ankaŭ instruas la prof-roj Carlos Augusto Silva kaj João Manoel Aguilera. Estas planita, ke ĉijare Campinas gastigos la 7-an Regionan Renkontiĝon, organizatan de prof-ino Ekvira Fontes, prezidantino de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo.

**VOTUPORANGA (SP)**

Prof-ro Valdemir Moreira, kiu nuntempe loĝas en ĉi tiu urbo, bonege eklaboris. Li sukcesis interesigi la urbestron D-ro João Antonio Nucci pri Esperanto, kies iniciaton li tuj aprobis. La 8-a Regiona Renkontiĝo okazos en tiu urbo. La intereso estas granda pri la kursoj ĉar plurdeko da personoj kontaktiĝis kun prof-ro Moreira. Li klopodas enkonduki Esperanton en la tiean fakultaton, kaj por tio li preparas geinstruistojn. Li petas, ke la esperantistoj sendu gratulleterojn al s-ro João Antonio Nucci, la urbestro, laŭ la adreso: Caixa Postal 43 - CEP 15.500 - Votuporanga (SP). Ni kore dankas ĉies kunlaboradon kaj gratulas al la juna kaj klopodema prof-ro Waldemir Moreira.

**SANTOS (SP)**

Prof-ro F. S. Almada daŭre aperigas artikolojn pri Esperanto en Brazilo kaj ekster ĝi en "A Tribuna" de Santos.

En la Spiritisma Societo Ismênia de Jesus s-ano Pedro Cavalheiro gvidas senpagan kurson pri Esperanto kun ĉeesto de pli ol 40 gelernantoj kiuj interesiĝis entuziasme pri la Internacia Lingvo. La kurso okazas ĉiudimanĉe de la 17-a ĝis la 19-a horo. Vizitinte tiun kurson ni konstatis, ke ĝi estas vere tre interesa kaj ke la gelernantoj jam kapablas paroli iomete en Esperanto. Ni havis okazon paroligi kelkajn el la gelernantoj, kiuj sin montris tre afablaj kaj bone komprenante la konversacion. Anstatuŭas prof-ron Cavalheiro la prof-ro Mauricio Foschi dum kelkaj semajnoj pro neatendita okupiteco da la instruisto.

Ni gratulas ambaŭ klopodemajn kursgvidantojn.

**SÃO PAULO (SP)**

Laŭ la raporto de Esperanto Asocio de San-Paŭlo la jaro 1980-a alportis kelkajn novaĵojn. Estis modifita la statuto por iomete ŝanĝi la nomon de la societo, kiu nun estas "Esperanto-Asocio de San-Paŭlo". La EASP aĉetis novan sidejon sed ne vendis la malnovan ĉe Av. Senador Queiroz, kiu estis aĉetita helpe de la anaro de la asocio. La nova sidejo estas unuunura sidejo de la esperantistaro, ne kolektiva kiel antaŭe, kio multe malhelpis la laboron de la Institucio.

La 15-an de decembro pasinta okazis interfratiga tagmanĝo kaj poste estis oficiale inaŭgurita la nova sidejo, sur la strato Faustolo, 124 - Agua Branca - CEP 5041 - São Paulo. Ĉe la inaŭguro, la rubanadon tranĉis la prezidanto de BKE prof-ro F. S. Almada, kiu, laŭsajne estis la plej malnova membro ĉeestante la sidejon.

Sekvis gaja festeno kaj enaŭguro de la pentraĵekspozicio de Maria Almada, favore al la movado. Vespere estis disdonitaj la premioj al la partoprenintoj de la konkurso de troboj organizita de EASP kaj grupo de esperantistoj vizitis la monumenton de L.L. Zamenhof sur la Placo Respubliko.

EASP havas bonan librovendejon. Senĉesan korespondan kurson. Instruas en la sidejo mem. Krom aliaj kunlaborantoj la geedzoj Francini elstariĝas helpante la movadon. La gazeto "Diário Popular" ĉiudimanĉe aperigas artikolon verkitan de la prof-ino Elvira Fontes pri Esperanto kaj la movado en Brazilo kaj tra la mondo.

S-anoj Deodato França Mello kaj D-ro Walter Francini ankaŭ verkas artikolojn por la "Folha da Tarde" kaj "Folha Espirita". Pluraj junaj gesamideanoj agadas konstante en la ejo de EASP, kiu fakte multe helpas la Esperanto-movadon en Brazilo. Laŭ la statuto oni rekrutas membrojn simpatiantojn por helpi la finpagon de la nova sidejo.

Sam-ino Fanny Dupré eluzas ĉiujn okazojn kaj propagandas pri la internacia lingvo. Ŝi apartenas al la grupo "Convivência Vila Nova, Sesc e Escola Aberta

de 3 Idades, kaj dum la kunvenoj ŝi ne perdas la okazon propagandi pri Esperanto. Sam-ino Dupré estas unu el niaj fidelaj esperantistinoj, ŝi dum la tuta jaro diligente agadas helpante al prezidantino de EASP, Elvira Fontes.

## RIO GRANDE (RS)

La gazeto "Rio Grande" aperigas artikolon pri Esperanto kaj la movado, verkita de nia s-ano Dirceu Porciuncula je memoro de L.L.Zamenhof, en la 15-a de decembro pasinta. Li ankaŭ donis ĝeneralan informon pri Esperanto kaj propagandis pri la 66-a UK okazonta en Brazilio! Bonega laboro.

## JORNAIS RECEBIDOS

Recebemos e agradecemos os seguintes informativos:

Guaru, ZET de Jugoslavio, O Lider, Correio Fraterno do ABC, Jornal da Cidade - Jundiaí, Folha Espírita, Rio Grande, Bulteno el Pernambuco, A Candeia, Suda Stelo, Folha do Subúrbio, Hora da Verdade, Bulteno de APE, Gazeta da Cidade, A Caminho da Luz, Revista Portuguesa de Esperanto, Diário de Jacareí, Gazeta da Cidade e Jornal de Ilhéus, os quais sempre trazem artigos alusivos ao Esperanto.

## DRAGUTIN WRANKA

Antaŭ unu jaro la Esperanto-movado en Argentino perdis sian diligentan membron: mortis S-ro Dragutin Wranka.

Li vivis en Argentino jam dum jardekoj, sed li estis jugoslavo. Laŭ la sciigoj de lia edzino, S-ino Serafina Wranka, ankaŭ esperantistino, s-ro Wranka lernis Esperanton en Vieno, kie li diplomiĝis en Komerca Altlernejo. En lia naskiĝ urbo Osijek, li kontaktiĝis kun izoluloj esperantistaj kaj fondis Esperanto-grupon en tiu urbo. Poste li ekinstruis la internacian lingvon en diversaj urboj de sia regiono. Li gvidis plurajn esperantajn kursojn samtempe, ĉar la intereso pri Esperanto tiam estis granda.

Post la dua mondmilito ili enmigris Aŭstrion, kie ili kontaktiĝis kun pluraj elstaraj esperantistoj.. El tiu lando ili vojaĝis al Parizo, kie ili jonatiĝis kun Raymond Swartz, ge-edzoj Insbrucker, ktp. Alveninte al Latin-Ameriko, ili en Rio de Janeiro konatiĝis kun la fratoj Delio kaj Nelson Pereira de Souza, kaj en Santos kun la Familio Almada, sed ili fiksiĝis en Argentino post mallonga restado en Cilio. En Argentino li gvidis diversajn kursojn laŭ la Ĉe-Metodo. Li estis kunlaboranto de la revuo "La Praktiko" (kiun li havas enmane en la foto) kaj aliaj periodaĵoj. Li estis revizoro de "Rio Esperantista" redaktita de Delio Pereira de Souza, kaj fine kunlaboranto de nia bulteno sub "Lingva Rubriko".

**Memoru ni ĉiam nian altestimatan kunlaboranton Dragutin Wranka.**



**Sur la foto la ge-edzoj Dragutin kaj Serafina Wranka legantaj "La Praktikon"**

## MONO POR LA BULTENO

Danke ni kvitancas la ricevon de la jenaj monhelpoj por nia Bulteno:

| | Cr$ |
|---|---|
| F. S. Almada - esperantaĵoj vanditaj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 1.000,00 |
| Antonio João F. Padilha . . . | 100,00 |
| Franscisco M. Sobrinho . . . . | 200,00 |
| Nicia de Mattos Borges . . . . | 394,51 |
| Claudio Zimmermann (dec-jan) . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 400,00 |
| Valdemir Barcelar . . . . . . . . | 100,00 |
| Euclides C. Silva . . . . . . . . | 500,00 |
| Francisca Martos . . . . . . . . | 500,00 |
| Jeremias de Jesus . . . . . . . . | 200,00 |
| Lauro J. de Oliveira . . . . . . . | 140,00 |
| Walter Francini . . . . . . . . . | 200,00 |
| Eleus Leonardo de Sá . . . . . | 200,00 |

## PRI TROBOJ KAJ NI

Iam S-ro Iso, prezidanto de la Asocio de Trobistoj de Sanpaûlo, lekciis pri troboj, ĉe Esperanto-Asocio de Sanpaûlo. Li kaj kelkaj kultivantoj de tiu popola literatura genro recitis por ni belajn ekzemplerojn, de sia aûtoreco aû de amikoj forestantaj. Amikoj, eĉ se kelkaj eventuale persone ne konataj de la ĉeestantaj, ĉar ankaû inter trobistoj ekzistas ia "samideaneco", ia "interna ideo", kiu igas ilin pli proksimaj al ni.

Poste oni realigis la trobokonkurson, kies taksjuĝantaron mi mem partoprenis, por la esperanta parto.

Kiel espereble, la nivelo de tiu lasta estis modesta, kompare al la portugallingva, kiu kalkulis je veteranaj konkursantoj.

Tuŝis min la senornama beleco de pluraj, kaj ili ŝajnis al mi unuavide tiel simplaj, ke mi ekinklinis sintrude porti ankaû mian plugilon sur la kvarversokampon.

Mi neniam estis provinta miajn kapablojn por poezia verkado, sed la tento argumentis eĉ per tio, ke . . . nu . . . jam okazis aliajn fojojn, ke iu trovis en si antaûe ne suspektitajn talentojn.

Tamen mi baldaû konstatis, ke

*Dense ion komuniki*
*per kvarverso popolstila,*
*krome ritmi kaj metriki,*
*nur antaûprove facila.*

Nu, esperantistoj kapablas, se ne ĉion, almanaû multon, kaj persiste inklinas.

*Sin doni al entrepreno,*
*ne ĉar venkos ni ĉe'l fino,*
*sed nur ĉar indas la peno,*
*ja nobla, eĉ se obstino.*

Sed ne nur obstinaj, ankaû pli aû malpli mildkoraj ribelemuloj estas inter ni. Ankaû malkonformistoj, eĉ se naivaj. Mi emas kredi, ke

*Cervantes vivis tro frue;*
*se post Zamenhof, je Kristo,*
*Kiĥoto agus kongrue:*
*estus li esperantisto.*

Kaj ne nur tiuj, kiuj, naive aû fundamentite, kredas je la vojo elektita. Ankaû la aliaj, se ili pli aû malpli laboras por la komuna celo, meritas niajn aplaûdojn kaj profundan respekton, ĉar ja

*Plej admirinda ĉe Kristo*
*estas se li dubis sin mem,*
*malgraû ke esperantisto*
*revenigas al la tem'*

Por ne lasi miskomprenon ĉe kristanoj mi montru ankaû trobon verkitan ne por, sed pro la konkurso:

*Kristo por ni, la homaro,*
*elkarniĝis pro l'amato.*
*Tro nanaj por tia faro*
*nur vidu ni homon frato.*

Jen melankolia reago al brila prelego kaj korfarmiga jonkurso. Pardonocele mi tamen komentu, ke ridi al si en la vizaĝo povas esti same stimula kiel ribelo, same konsola kiel rezignacio. Cete.

*Sin mem rigardi humure*
*sen amaro, kun ironi',*
*facilkore, sentorture,*
*povas nur homo, do, ni.*

**Kovito**

---

## CAMPANHA DA SEDE PRÓPRIA

A vitoriosa campanha nacional, que possibilitou ao Conselho Brasileiro de Esperanto a aquisição de sua sede própria no coração comercial de Brasília, e que demonstrou ao mundo a pujança e o despreendimento dos esperantistas brasileiros, será oficialmente encerrada em 30 de abril de 1981.

De conformidade com o regulamento da campanha, todos os doadores que, até a data de encerramento citada, tiverem integralizado a cota mínima de Cr$ 10.000,00, serão homenageados com a inscrição de seus nomes em grande placa de metal que mandaremos cimentar em uma das paredes internas da sede social.

A inauguração dessa placa, bem como a outorga, ao nosso Presidente, da escritura definitiva de aquisição do imóvel, deverão ocorrer entre 25 de julho e 1º de agosto, período em que se desenvolverá em Brasília o 66º Congresso Mundial de Esperanto. Por isto mesmo, espera-se que aos acontecimentos estejam presentes diretores da Associação Mundial de Esperanto e outras eminentes autoridades do esperantismo pátrio e internacional.

Para conhecimento geral, a seguir relacionaremos as contribuições recebidas pela tesouraria até 31-12-80; antes, porém, aproveitaremos o ensejo para pedir àqueles que ainda não completaram o pagamento de sua cota de Cr$ 10.000,00, ou que pretendam ainda aderir à campanha, que remetam suas contribuições em tempo hábil, a fim de que possamos mandar gravar seus nomes na placa comemorativa acima referida. Os cheques, ordens bancárias ou vales postais devem ser emitidos a favor do Conselho Brasileiro de Esperanto e remetidos para o endereço de nosso Tesoureiro, samideano Carlos Augusto Siqueira da Cunha, Caixa Postal, 13-2088, CEP 70000 - Brasília (DF).

## CONTRIBUIÇÕES RECEBIDAS ATÉ 31-12-80

| | Cr$ |
|---|---|
| Allan Kardec A. Costa . . . . . | 10.000,00 |
| Álvaro Rabelo . . . . . . . . . . | 10.000,00 |
| Antônio Bezerra de Oliveira . | 10.000,00 |
| Antonio de P. Soares . . . . . . | 1.000,00 |
| Antônio R. da Silva . . . . . . . | 10.000,00 |
| Ary Zamora . . . . . . . . . . . | 8.000,00 |
| Balbina Ferreira . . . . . . . . . | 4.000,00 |
| Banco do Brasil S.A. . . . . . . | 20.000,00 |
| Banco Nacional S.A. . . . . . . | 5.000,00 |
| Banco Regional de Brasília S.A. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 10.000,00 |
| Carlos Augusto S. da Cunha . | 10.000,00 |
| Carlos Henrique Dionísio . . . | 10.000,00 |
| Cláudio Zimmermann . . . . . | 10.000,00 |
| Décio Estrela Maia . . . . . . . | 1.000,00 |
| Délio P. de Souza . . . . . . . . | 10.000,00 |
| Edson da Costa Ribeiro da Fonseca . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 3.500,00 |
| Elias Couto de Almeida . . . . | 20.000,00 |
| Elmano R. A. Barbosa . . . . . | 10.000,00 |
| Elvira Fontes . . . . . . . . . . . | 10.000,00 |
| Enivaldo Alves Silva . . . . . . | 4.500,00 |
| Eugênio Doin Vieira . . . . . . | 8.000,00 |
| Eugênio José Gramignia . . . . | 10.000,00 |
| Eurico Antônio Ribeiro . . . . | 2.500,00 |
| Fanny Dupré . . . . . . . . . . . | 10.000,00 |
| Francisca Martos . . . . . . . . | 10.000,00 |
| Francisco R.de M.Sobrinho . | 10.000,00 |
| Francisco Souza Almada . . . | 10.000,00 |
| Gilberto A.Silva Velho . . . . . | 10.000,00 |
| Godofredo de Araújo Goes . . | 9.000,00 |
| Gomercindo Dias Nunes . . . . | 10.000,00 |
| Hélio Fontoura Aderne . . . . | 3.000,00 |
| João de Oliveira Gama . . . . . | 10.000,00 |
| José C. de Carvalho . . . . . . . | 10.000,00 |
| José Dias Pinto . . . . . . . . . . | 8.500,00 |
| José Passini . . . . . . . . . . . . | 2.000,00 |
| Lair Alves Moreira . . . . . . . | 6.000,00 |
| Luiz M. S. da Silva . . . . . . . | 10.000,00 |
| Luiz Teixeira da Silva . . . . . | 4.000,00 |
| Manoel B. dos Santos . . . . . | 1.000,00 |
| Marcello V. de Andrade . . . . | 10.000,00 |
| Maria Júlia J.R. da Cunha . . . | 10.000,00 |
| Maria P. Almada . . . . . . . . . | 10.000,00 |
| Mauro Gomes Azevedo . . . . | 10.000,00 |
| Mauro Libânio da Fonseca . . | 6.000,00 |
| Modesto B. de Abreu . . . . . . | 20.000,00 |
| Nelson Bernardo . . . . . . . . . | 1.000,00 |
| Nelson Pereira de Souza . . . . | 10.000,00 |
| Nelson Ribeiro . . . . . . . . . . | 10.000,00 |
| Nelson Silveira . . . . . . . . . . | 10.000,00 |
| Nydia Aydos Krieger . . . . . . | 10.000,00 |
| Onésimo da Costa e Faria . . . | 600,00 |
| Oswaldo Arruda Stein . . . . . | 10.000,00 |
| Pedro F. Machado Marques . . | 500,00 |
| Sirio Silva . . . . . . . . . . . . . | 1.000,00 |
| Sorocaba Esperanto-Klubo . . | 1.000,00 |
| Waldemar Antônio Mendes . . | 10.000,00 |
| Walter Augusto Francini . . . | 10.000,00 |
| Wilson Pereira Deslandes . . . | 10.000,00 |
| Yvone Aydos Krieger . . . . . | 10.000,00 |

## IDEOJ ESTAS BEZONATAJ

Kiel jam anoncite, la 25an de Julio 1981, la brazila poŝto lanĉos memorigan poŝtmarkon okaze de la 66-a Universala Kongreso en Brasília.

La Loka Kongresa Komitato estis invitita prezenti sugestojn al ECT pri la temo de la poŝtmarko. Jen do favora okazo por niaj reklam-desegnistoj aktive partopreni en la kreo de la oka Esperanto-poŝtmarko eldonota de la brazila poŝto. Ni invitas ilin sendi grafikajn ideojn, **nepre antaŭ la 20a de Februaro**, al la adreso de LKK en Brasília.

La aŭtoro de la ideo elektota por la poŝtmarko, ricevos libro-premion.

## GRAVA ALVOKO AL KUNLABOREMAJ ESPERANTISTOJ

Esenca faktoro por la sukceso de Universala Kongreso estas la preteco de nombra grupo de volontuloj kunlabori dum la kongresa semajno por la glata disvolviĝo de la diversaj servoj. LKK-Brasília lanĉas alvokon al ĉiuj brazilaj esperantistoj, kiuj jam aliĝis la kongreson, kaj petas la helpon de la lokaj societoj por diskonigi tiun alvokon inter siajn membrojn.

### Postuloj

Ĉiu membro de la Loka Kongresa Komitato bezonos helpantojn en la diversaj departementoj kaj deziras, ke tiuj homoj ne nur havu facilecon en rapida kompreno, sed ankaŭ ĉarmon en homaj interrilatoj, sufiĉan kapa = blon konversacii en Esperanto, abne = gacion kaj pretecon ensalti por solvi ĉiuspecajn ne antaŭvideblajn problemojn kaj plenumi eĉ plej modestajn taskojn.

### Ofertoj

- Ĉiu kunlaboranto preta laŭ = vice deĵori aŭ resti je dispo = no de LKK ĉirkaŭ **6 horojn tage** dum la kongresa semajno, ricevos poŝmonon en kruzeroj, ekviva = lentan al 70,00 guldenoj.
- La loĝado dum la kon = greso okazos laŭ la kondiĉoj publikigitaj en la revuo Esperanto (decembro '80, p. 202).

Ni ne dubas, ke en tuta Brazilo ekzistas tiuj bonvolemuloj deziremaj kontakti aktive kun la kongresanoj el ĉiuj partoj de la mondo. La interesatoj bonvolu skribi, **antaŭ la fino de Februaro** al

LKK de la 66-a UK de Esperanto
SCS - Ed. Jockey Club - Sala 103
Caixa Postal 04-0406
**70000 Brasília - DF**

aldonante unu foton. Inter la kandidatoj, oni selektos minumume 30 persosonojn al kiuj oni sendos detalajn instrukciojn antaŭ la fino de aprilo.

### LA UNIVERSALAJ KONGRESOJ

Traleginte la kongresan Libron de 1a 65a U.K. en Stockholm, oni rimarkas, ke en multaj landoj ankoraŭ ne okazis kognreso. La Estrato de U.E.A. lastetempe sukcesis ricevi inviton de landoj kie ankoraŭ ne estis U.K. Ni vidu, en 1981 ĝi okazos en Brasília, ĉefurbo de nia lando, en 1977 en Reykjavok, Islando, en 1976 en Athinai, Greklando, kaj en 1965 ĝi okazis en Tokyo. Japanio, unuafoje en Azio.

Jen estas la landoj kie okazis la U.K.:

Svislando, Britio kaj Germanio (6),
Francio, Pollando (5),
Belgio (inkluzive la 67a), Nederlando (4),
Usono, Aŭstrio, Svedio, Danlando (3),
Hispanio, Finnlando, Hungario, Italio, Jugoslavio, Bulgario (2),
Ĉeĥoslovakio, Skotlando, Novergio, Japanio, Greklando, Islando, Brazilo (1).

Ni deziris esplori la nomojn de landoj ankoraŭ ne okazintaj U.K. - oj, sed ni rimarkis ke kelkaj el ili havas malfortan movadon por Esperanto. Tial do ni forigis tiujn, kie U.E.A. havas malpli ol dekon da individuaj membroj, kaj en la rezultato.

Ne okazis U.K. oj en la landoj (parenteze la nombro da individuaj membroj de U.E.A.):

- Aŭstralio (121), Ruslando (90), Kanado (87), Nov-Zelando (71), Argentino (67), Israelo (53), Rumanio (36), Koreo (36), Portugalio (31), Neksikio (22), Kolombio (21), Sud-Afriko (18), Venezuelo (16) kaj Luksenburgo (12).

La numeroj estas prenitaj el Jarlibro 1980, membroj en 1979. Entute 5 landoj en Ameriko, 4 en Eŭropo, 2 en Azio, 1 en Afriko kaj Aŭstralio. Ĉu baldaŭ la tutmonda esperantistaro havos okazon interkonatiĝi kun novaj landaj movadoj? Ni esperas, ke nia movado fariĝu ĉiam pli internacia.

(Informoj senditaj de nia s-ano Delio Pereira de Souza).

### RIO GRANDE (RS)

Nova estraro de la Esprantista Societo de Rio Grande:

Prezidanto: D-ro Manoel Torres de Abreu; vicprezidanto: K-elo Dirceu Porciuncula; I-a sekretario: Studento Roberto Valentini Rosa; 2-a skretario: Studento João Alberto Ferreira Lima; 1-a Kasisto: S-ino Maria Pereira; 2-a Kasisto: S-ro Duilho Calcagno; Bibliotekistino: F-ino Delair Dumont. - Kontrola Konsilantaro: S-ro Nery de Freitas Braga, s-ino Tusnelda Reinhardt Halfenka s-ro Domingos Caruso.

Ni gratulas la novajn batalantojn, dezirante ke la societo daŭrigu la belan laboron de siaj antaŭuloj.